

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: Glorieta de Bilbao, 5.

Julio Mangada Rosenörn.—MADRID

II^a
JARO

NUM. X KAJ XI.—OKTOBRO-NOVEMBRO

II^a
JARO



VIII.^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

(Oviedo de la 14.^a ĝis la 18.^a de septembro ĵus pasinta)

La 14.^{an}, je la 11^{1/2}, okazis la malferma kunsido sub prezido de la Provincestro, generalo Zubillaga, delegito de Lia Reĝa Moŝto Don Alfonso XIII.^a, en la ĉefa salono de la palaco de la provinca Deputataro, kun ĉeesto de la civilaj kaj militaj aŭtoritatuloj. Parolis unue la prezidanto de la loka organizinta Komitato, S-ro Jimenez Mora, por esprimi salutojn kaj dankojn ĝeneralajn kaj prezenti al la generalo por trasdono al Lia Reĝa Moŝto la oran emajlitan insignon de la Kongreso. Reprezentanto de la provinca Deputataro kaj la Urbestro de Oviedo sin turnis al la Kongresanaro per korsindonaj paroloj pri la frata akcepto de la regiono kaj de la urbo kaj pri la plej sinceraj bondeziroj al la Kongreso. Dume la muzikistaro de la infanteria Regimento «Princo» ludis muzikaĵojn, el ili «La Espero'n» kaj la himnon de la asturaj esperantistoj. Je la eliro oni filmis la ĉeestantaron. Sekve ni aliris al la urbestrejo, kie la urbestro ĝentile nin akceptis kaj nin regalis malavare per luksa kaj abunda lunĉo, post sinceraj paroloj de la Urbestro.

Posttagmeze okazis vizito al monumentoj kaj al tre rimarkinda romanstila kaj tre malnova preĝejo «Sankta Mario de Naranco», iam, je la unuaj tempoj, palaco de la astura reĝo, staranta kelkajn kilometrojn de Oviedo sur la deklivo de la monto Naranco. Tiel oni ĝuis arton, antikvaĵon kaj belegajn panoramaĵojn kompanse de laciĝo kaj ŝvitado.

Je la vespero okazis la unua laborkunsido de la Kongreso, sub prezido de S-ro Jimenez Mora, elektita por tiu posteno laŭ kutimo de niaj Kongresoj, farante la sekretarian laboron, pro la sama elekto, S-ro Rodriguez Escartin. Ni kunvenis en la ĉefa salono de la Popola Ateneo, pro sindonema decido de ĝia komitato, kiu disponis sian sidejon por nia akceptejo kaj kongresejo, pro kio tiu institucio tre kulturema meritas la korajn dancojn de la hispana esperantistaro.

La 15.^{an} matene estis solenega meso kantata kaj esperanta prediko de pastro Cristobal Fournier, tre kompetenta kaj malnova esperanta pioniro, kiu, klare prononcante, flue, korekte,

elokvente kaj poezie, parolis unue pri la astura regiono kaj ĝia akcepto al hispanaj samideanoj; due, pri la ĉefa temo de la prediko, kies tezo estis tute vere zamenhofa. Mi aŭdis predikojn el diversaj religioj okaze de internaciaj kongresoj, kaj mi konstatas, ke la predikon de S-ro Fournier mi metas unuvice kun tri aŭditaj de mi, kun tiu de rabeno dum la Kongreso de Berno (Svisujo. 1913), kun tiu de fraŭlino protestanta dum la Kongreso de Genevo (Svisujo. 1925) kaj kun tiu de holanda protestanta pastro dum la Kongreso de Antverpeno (1928).

Sekve la multenombra kongresanaro, ĉar de la proksima urbego Gijón venis pli ol kvindek gesamideanoj, aliris inaŭguri la unuan Internacian Ekspozición el lernejoj laboritaĵoj organizitan per Esperanto kun esperanta fako. Unue, hispane, bonege parolis la iniciatinto kaj organizinto S-ro Luis Garcia Fernandez, rimarkigante gravecon de Esperanto kaj ĝian utilon al tutmonda kunlaborado fratama kaj dankante la provincan ĉefinspektoron pro la sindonema helpo al la Ekspozicio permesante ĝin instali en nacia lernejo. Sekve la ĉefinspektoro de la provinco, S-ro Anieva, elokventege vidigis la gravecon de la lernejlaboro, de la interrilatigado de ĉiunaĉiaj Lernejoj por la tutmonda paco, kiun oni atingos vere per la Lernejoj, per instruado kaj edukado de la geinfanoj kaj ilia interrilatigado, vekante en ilin tiel veran fratamon; fine li konstatis, ke la abunda kaj riĉa materialo amasigita pere de Esperanto profunde impresis lin kaj lin konvinkis pri la utilo de nia lingvo, kiu tiel kaj tial varbis lin malgraŭ liaj antaŭaj pli, ol neatentemo, nefidemo kaj nekredemo.

Postagmeze, per aŭtobusoj, ni ekĝuis la senpagan ekskurson al la tipa pilgrimekskurso de Noreña. Bedaŭrinde, tutan posttagmezon milde pluvadis kaj ĉi tio malutilis al ni. Solene akceptis nin la vilaĝaj aŭtoritatuloj kun la vilaĝaj samideaninoj tipe vestitaj. La vilaĝestraro, ĉe la vilaĝestrejo, regalis nin per abundaj variaj kukoj, konfitaĵoj, ŝinko, k t. p., vinoj kaj pomvino, kiujn al ni proponis per sinceraj fluaĵoj hispanaj paroloj reprezentanto de la vilaĝestro. Oni kantis la asturan esperantan himnon kaj regionajn popolkantojn. Fine, ĉar la pluvo, kvankam milda, persistadis, la gesamideanoj disigis grupojn kaj sufiĉe bone kaj agrable pasigis la tempon ĉu vizitante la ermitejon, ĉu dancante en la Ateneo de la vilaĝo, ĉu gustumante

kolbasojn, fromaĝon, *sidron* (pomvinon) tipajn. En tute, spite de la pluvo, ĝojon, ŝaton, kontenton vidigis, la sintenado de la samideanaro.

Nokte, sub prezido de S-ro Azorin, vicprezidanto elektita, okazis en la Kongresejo la dua laborkunsido.

La 16.^{an} antaŭtagmeze, okazis la tria laborkunsido ĉe la sama loko; sub prezido de S-ro Jimenez Mora, kaj tuj ni aliris al palaco de la provinca Deputataro, ĉaĉ ĉi tiu akceptis kaj lukse regalis nin.

Posttagmeze ni ĉeestis la gravegan muzikan feston organizitan de l' *Orfeon Ovetense* (Ovieda Ĥoraro), konsistanta el pli ol cent gekantistoj, kun kunlaborado de la bonega muzikistaro de la jam aludita Regimento, ĉe tre ampleksa komforta kaj luksa Teatro Principado, kiun tutplenigis la gekongresanoj kaj multenombra publiko. La muzikistaro ludis «La Espero'n», kiun ni kantis stare sub la magia bastoneto de la muzikestro, kiu verŝajne posedas ensorĉan forton en sia rigardo kaj movoj de la tuta korpo por unuigi kantistojn kun muzikistoj. Neniam mi aŭdis nian himnon tiel unutakte ludita kaj kantita; sed mirinde la tuta ĥoraro kun la muzikistaro kantis kaj ludis la ĉu imponan kaj majestan, ĉu viglan kaj energian himnon de la asturaj samideanoj; ĝia muziko superas tiun de multenombraj himnoj ĉu naciaj, ĉu internaciaj. La muzikistaro ludis koncertan muzikaĵon belegan, per kiu ni povis rimarki la eksterordinaran direktkapablon de la muzikestro, kiu per gestoj, paroloj, movoj de brakoj kaj manoj, balanciĝado de la trunko eĉ movoj de la kruroj, ĉiel, direktas mirinde, tiamaniere, ke eĉ la publiko sin sentas tirata, influata, de lia direktkapablo, kvazaŭ magnetoforto. La Ĥoraro ĥore aŭ sole kaj ĥor-sole, satigis nian plej postuleman muzikemon per belegaj popolkantoj asturaj, iuj tre spritaj, el ili jen «Kanto de Blindulo», el la verko «Festo en la vilaĝo» de l' muzikverkisto Torner, kiun mi tradukis:

Aŭskultu rakonton!

Mi komencas jam :

Mario fariĝis

edzino de Johan'.

Hejme li laboras,

faras diligente,

feliĉe, kontente,
laborojn de l' pan.
Plej bona el mondo
estas nur Johan'!

Ĉiuj vilaĝanoj
ŝercas pri Johan';
estas nur envio
de kalumniant'.
Ve, mia karulo!
ne atentu tion,
ci faradu ĉion;
al ci bono jam.
Plej bona el mondo
estas nur Johan'!

Sanktuloj ĉielen
loĝas, laŭ la fam';
tien iros rekte
mia la Johan'.
ĉiam li, kontenta,
agas laŭ necese,
vigle kaj senĉese,
por la hejma plan'.

Plej bona el mondo
estas nur Johan'!
Mario fariĝis
edzino de Johan'!

Dum interrompo de la festo oni ornamis la flagojn de la
Ĥoraro kaj de la Grupoj per silkaj verdaj rubandoj rememori-
gantaj la Kongreson, kaj S-ro Maynar hispane, elokvente kaj
bonhumore, je la nomo de la hispanaj esperantistoj salutis kaj
dankis asturojn. Luis Garcia Fernandez, el la loka Komitato
konigis la premiitajn lernejojn el tiuj de dekkvar landoj parto-
prenintaj la Ekspozicion:

- I.^e premiita. — II.^a Lernejo de Oslo (Norvegujo);
- II.^e premiita. — Nacia Lernejo de Gilena (Sevilla-Hispanujo);
- III.^e premiita. — Lernejo de Hobäk (Danujo)
- IV.^e premiita. — Nacia Lernejo *Altamira* de Oviedo (Hispanujo).



Denove «La Espero» estis kantata kiel finaĵo de la festo, kiu estis mirinda de ĉiuj vidpunktoj.

La 17.^{an}, la kongresanaro plejparte ekskursis tuttage per aŭtobuzoj, por ĝui eksterordinare tra la mirindega astura kamparo, por fari neforgeseblajn vizitojn. Kiamaniere pritrakti la tuttagan ekskurson? Amaso el fortaj impresoj kaj profundaj emocioj, kvazaŭ ekstazoj antaŭ la imponaj grandiozaj naturbelajoj, spirita enprofundiĝo pro historiaj rememoroj... Sed mi komencu la kiel eble plej realan kaj koncizan raporton: la motoroj ekbruegiĝis je la oka matene kaj tuj ni deiris al Villaviciosa sur la aŭtobusoj esperante ornamitaj, la ekskursantoj el la du grandaj veturiloj agrabligis la motorbruadon per diversaj kantadoj kaj mirinterjekcioj pro la mlrindaj panoramoj de la kamparo; ni alvenis al Villaviciosa, kie ni vizitis malnovan romanstilan preĝejon, el kiu nur la ĉefportalo vekis artan intereson, kaj tuj ni aliris viziti la faman fabrikon de sidro (povino) «El Gaitero» (La Flutisto): la mastro, jam ekmaljunuliĝanta, altkreska baj tre simpatia, akceptis nin afablege, fakon post fako, vidigis kaj klarigis al ni ĉiam bonhumore eĉ sprite la maŝinaron kaj industrian: jen la vasta pomlavejo en kiun oni ĵetas la pomojn, kiuj memlaviĝas per la fluo de l' akvo, de kie ili solaj eliras por envagonetiĝi kaj aliri fali en tranĉmaŝinoj kaj de ĉi tiuj, dispecigite, en grandajn fenditajn kestegojn cilindroformajn de la premiloj, en kiuj la pomoj liberigas la sukon tuj fluantan al grandaj bareloj, en kiuj la suko fermentiĝas kaj fariĝas sidro por alflui post kelke da tempo al novaj maŝinoj por la emboteligado kaj ŝtopado. Agrablege ni trairis la vastan industriejon kaj ni vidis multenombrajn virinojn, ĝenerale junajn fraŭlinojn belajn eĉ belegajn, kiuj sin okupis pri la inspektado de plenigitaj boletoj kaj pri la algluado al ili de banderoloj. Starante kun aliaj samideanoj antaŭ belega blonda laboristino hispane mi ekkriis mirigate: «Ĉi tie mi volus fariĝi boteleto por esti karesata de tiuj feinaj manoj». Sekve la mastro gvidis nin al vasta malplena tenejo, en kies centro staris longaj tavoloj kobritaj de blankegaj tablotukoj, plenplenaj el bongustega montara ŝinko, el diversaj kolbasoj, olivoj, bulketoj, konfitaĵoj, kukoj, boteloj da sidro, kaj da nefermentata pomsuko. Eksterordinare malavarege regalis nin la fabrikmastro, kaj li, kvazaŭ diablo, tentis nin senĉese al ebriiĝo per sia nektaro, ĉar vere

ni estis ĉe kvazaŭ paradizo en kiu belegaj brunaj kaj blondaj Evoj proponadis al ni, kun ĉia manĝaĵo, ne la pomon sed la pomesencon, olimpan nektaron, kaj neeble rezisti la tenton, kiu estus estinta kapabla rifuzi el perlamotaj manoj de rozvizaĝaj belulinoj la trinkindan *sidron* proponitan de nature ĉerizaj ridetantaj lipoj? Je ĉi tiuj momentoj estis kiam mi konsciis, ke Adamo ne estis kapabla rezisti la tenton! Vere la tre simpatia, bonhumora kaj sprita fabrikmastro estas diablo, sed bonega diablo, ĉar li ne faras meĥanike kelkajn laborojn de la fabriko por ke multaj virinoj de Villaviciosa havigu al si monrimedojn por la vivo; mi altestimas vin, karan diablom, ĉar ankaŭ mi povis konscii per viaj diroj, ke vi sentas nian internan ideon, kaj mi vin dankas tutkore ne nur je la nomoj de la regalitoj sed ankaŭ de la tutmonda esperantistaro ĉar vi decidis meti sur grandan barelon el la fermentejo la nomon de nia kara Majstro same, kiel vi metis aliajn famajn. Ni esperu, ke la pomvino el la Zamenhofa barelego inspiros ekeke vizitontojn kaj ilin varbos al nia afero! Ankaŭ ni ricevis belajn kaj utilajn reklamilojn, luk-sajn meĥanikajn kraĵojn, notlibretojn kaj speguletojn. La mastro akompanis nin al la aŭtobusoj kaj adiaŭis nin: la moto-roj ekfunkciis kaj ni deiris ekkriante huraojn kaj vivojn al la sindonema kaj ĉiel simpatia fabrikmastro.

Ĉiam tra la belega kamparo, tra vilaĝoj, ni ektrafis plej abruptan kamparon. Oni estis aranĝante la ŝoseon, kiun laboristoj kovris el balasto. Ni eksupreniris. Baldaŭ la aŭtobuso, kiu iris antaŭ mia, supreniris malfacile, ĝi malrapidiĝis, ĝia motoro stertoris kaj la aŭtobuso haltis, ĉar ĝi ne povis venki la deklivon. La gesamideanoj estis devigataj forlasi la aŭtobuson kaj piediri iuj sur la ŝoseo, aliaj, bravaj alpinistoj, celis kaj trafis altaĵon, kie ili atendis la aŭtobuson ĉe jam plej delikata deklivo de la ŝoseo. Mia potenca aŭtobuso supersarĝata de aliaj samideanoj, kiuj ne volis piediri, venkis ĉiajn malfacilaĵojn. Jen ni, ĉiuj ĉe la Rigardejo de Fito. Nin ĉirkaŭis imponaj perspektivoj mirindaj entenantaj mirigantaj naturbelajaĵoj: altajn pintojn akrajn de Eŭropo ŝirantajn la belege bluan lazuron; grandiozajn roktrancaĵojn, kies suprojn envolvas la nebuloj; la bluan milde ondigaŭntan maron, kiu kvazaŭ kisas kaj lulas la landon mirindan; arbarojn el pomarboj kaŝtanoj, pinoj k.t.p. ĉe montoj kaj valoj... Rapide, post impresanta trarigardado, ni malsu-

preniris tra la ĉie kaj ĉiam belega kamparo al *Cangas de Onís*. Jen dekstren la malnova gracia romana ponto iom kovrita de ĉiam verda rampanta hedero; kaj fine ni sidis laŭlonge la tabloj pretaj por la tagmanĝo. No avide atendis la manĝaĵojn, ĉar de ili en nin venanta odoro stimulis nian apetiton: bonegaj, abundaj, bonspicitaj manĝaĵoj nin satigis. Ni manĝis en plej granda kontento kaj bonhumoro, kiu inspiris iun improvizi hispanan versaĵon spritan, kiun mi legis je la fino kaj kies traiduko estas jena:

Pluvo malagrabla
ĉe Norenjo... Nia
stato malafabla
estus ja malbono...
Sed la Sun' nin ridis
de malantaŭ ŝtono.
Ĉe Norenj', pluvfalo.
Inter ni, konkordo,
kaj ne la batalo.
Vivu la Kongreso!
Spite, do, de ĉio,
estis ja sukceso!

Denove ni vojaĝis al *Covadonga*. Baldaŭ ni eniris la faman intermonton en kiu la pejzaĝo imponiĝas, grandioziĝas pli kaj pli, ĉar la valo mallarĝiĝas des pli ju pli en ĝin eniras, ĝis loko, kie ĝin fermas altegaj roktrancĉaĵoj. Ĉe unu el ĉi tiuj malfermiĝas la historia groto de Don Pelaĵo, kiu entenas la kapeleton de la Sankta Dipatrino kaj modestajn tombojn de tiu kaj de alia astura reĝo, Alfonso la Ĉastulo. El la impona roktrancĉaĵo, suben de la kapelo, ŝprucas vera rivero formante belan kaskadon el pura akvo. Moderna baziliko kun apudaj konstruaĵoj staras sur rokplataĵo; ĉe unu el ĉi tiuj konstruaĵoj ni vidis la muzeon kaj riĉan trezoron de la Sankta Dipatrino de Covadonga.

Ĉe la roktrancĉaĵo el kiu ŝprucas la torento, estas fonto kies akvo havas specialan jefikon laŭ la tradicio: geedzoj, trinkinte, precizajn fojojn, repatriĝos, kaj ĉi tion konstatis al mi nia eminenta samideano inĝeniera subkolonelo kaj aeronaŭtika aŭtoritaluto Emilio Herrera, ĉar trinkinte li kaj lia edzino dum vizito al Covadonga ok jarojn de post la lasta filo, ili ĝustatempe post

la trinkado repatriĝis, pro kio nomis la filon Pelajo. Laŭ la tradicio, fianĉo kaj fianĉinoj, rapide starigos familion post la trinkado; kaj jen kial bela simpatia samideanino, kiu sopiras al vigla, simpatia kaj laborema samideano, trinkis kaj trinkadis kaj proponis la akvon al sopirato, kiu, dum mi observadis, rifuzis, ĉar eble, laŭ lia opinio, ankoraŭ estas frue por edziĝi, sed mi opinias, ke li tre plaĉe trinkis la puran akvon feliĉigontan, kaj ke same faris preskaŭ ĉiuj. Mi konfesas, ke mi ne trinkis kvankam mi iomete soifis kaj min altiris la purecon de la akvo kaj ĝia melodiasusuro; sed malpermesis al mi trinki du konscioj: ĉu mi denove patro post tiom da penado, kiam mi bezonas libertempon kiel eble plej grandan por Esperanto? Ĉu mi vidvigoŝta se mi erarus je la trinkado, ĉar ankaŭ la akvo efikas tie!, kiam mi bezonas nepre la kuneston de mia edzino, kiu fine esperantiĝis post multjara kontraŭstaro al nia sankta afero, kiun ŝi nun konsideras vera idealo? Neniell! Kaj mi ne trinkis, ĉar mi jam trinkadis sukcese la kalikon da senpacienco por sukcesi.

Ekkrepuskiĝis kiam ni forlasis *Covadonga'n* por returneniri al Oviedo. Ni atingis preskaŭ nokte la fiŝbredejon de Infiesto kaj malmulte ni povis vidi, sed ni povis konstati la bonegan aranĝon de la fiŝbredejo kaj eĉ evoluadon de fiŝivo, de la ovo en maturan fiŝon, ankaŭ la ĉarnegon de la loko kun ĝiaj multenombraj kanaloj tra kiuj rapidfluas la akvo de lageto en lageton, por favori la evoluadon de trutoj kaj aliaj fiŝoj. De ĉi tie, tute nokte ni rapidiris, sed ni haltis momentojn ĉe placo de vilaĝo altirante atenton de la multenombra promenanta publiko per niaj esperantaj kantoj kaj per asturaj kantoj sole kantataj de asturo el nia karavano. Tuj al Oviedo, kaj post disigo, vespermanĝinte bone pro granda apetito, certe la plimulto faris kiel mi: enlitiĝis. Eble iuj songis pri la efikoj de la akvo de Covadonga, kaj eĉ iuj fraŭlinoj songis esti jam edzinoj, mi, kiel rokpeco kaj netrinkinte, perdis tutan konscion.

La 18.^{an}, je la oka matene, la plimulto el la gekongresanoj vojaĝis vagonare al proksima gravege industria urbego *Gijon*, ĉe kies stacidomo atendis nin la hihonaj pioniroj pastro Fourrier kaj inĝeniero Menendez Rua kun multenombraj gesamideanoj. Piede, kun la flagaro kiel avangardo, ni aliris al urbo-domo por lasi la flagojn, kaj poste ni iris al la malnova haveno por enŝipiĝi kaj marekskursi al proksima vasta kaj gravega



haveno Musel, ĉar ĉi ties ĉefingeniero kaj direktoro, nia tre kompetenta samideano S-ro Eduardo de Castro disponis vaporŝipeton de la haveno al ni. Ni vizitis la havenon Musel kaj marekskursis feliĉe, ĉar marmalsano, malgraŭ balancigado de la ŝipo, neniun trafis. Elŝipiginte, per du grandaj luksaj aŭtobusoj, la ĥihonaj samideanoj ekskursigis nin por koni la belajn ĉirkaŭaĵojn kaj marbordon; kaj je la tagmezo proksimume, ĉe la Parko Somio, ni havis la komunan tagmanĝon sur la herbejo kaj sub la bela kobaltblua ĉielarkaĵo, reŝesigate de la mara venteto, kies jodo vekis bonan apetiton en nin, kaj kiun ni satigis precipe per la tipa bongustega manĝaĵo nomata «fabada», konsistanta el grandaj blankaj fazeoloj, diversaj kolbasoj kaj ŝinko. Vere ĉi tiu manĝaĵo helpate de vino sed plibone de sidro estas manĝaĵo por revivigi mortinton. Apenaŭ oni povis gustumi alian manĝaĵon el la abundaj kaj bonege spicitaj. Ni profitis la komunan tagmanĝon por okazigi labor-kunsidon, legante kaj aprobante la konkludojn de la Kongreso, kaj paroladante mallonge iuj pri necesa unuiĝo kaj sincera kunlaborado. Tuj ni aliris al la urbodomo por fermi brile la Kongreson sub prezido de Lia Reĝida Moŝto Don Jaime: tiel okazis ĉe la ĉefsalono kun ĉeesto de la provincaj kaj urbaj aŭtoritatuloj kaj de multenombra publiko, kaj fine la urbeŝtraro regalis nin per luksa abunda lunĉo en alia granda salono de la urbodomo. Neniel ni povis imagi plej brilan kaj gravan fermon de la Kongreso, kiun ni ŝuldas al niaj ĥihonaj samideanoj.

Sekve de la fermo, per la aŭtobusoj disponitaj, ni iris de loko en lokon, vizitante la Maran Klubon, la Popolan Ateneon, la Katolikan Klubon kaj la Urbon, kaj ĉie oni akceptis nin ĝentilege. Dum la trairado de la stratoj, flirtantaj la verdaj flagoj, ni altiris konstante atenton de la publiko, farante bonan propagandon. Ekvesperigis kiam ĉe la stacidomo venis la reciproka adiaŭo: la ĥihonaj samideanoj frate adiaŭis nin, kaj ni ilin kun sinceraj dankesprimoj pro ilia gastama akcepto, kun varmaj gratuloj pro ilia sukceso por la fermo de la Kongreso kaj kun bondeziroj al granda esperanta progreso de la ĉarma simpatia kaj laborema urbo. Post unu horo vagonare, dum kiu oni kantadis kaj babiladis; ni atingis Oviedon, kaj ĉe la stacio mem, antaŭ ol disigi, jam ni adiaŭis unu la alian ĝis..... revido en.....

Kelkaj el ni, madridaj kaj andaluziaj samideanoj precipe,

akompanis S-ron Azorin al la Popoldomo, kie li faris belegan paroladon pri Esperanto por la Laboristaro.

Pro la pluvo oni ne povis bruligi artan pulvofajron je la honoro de la Kongreso, kiun ni ŝuldas al la Urbeŝtaro de Oviedo. Certe ĝin bruligis dum la festoj de la urbo, farante tiel bonan propagandon post nia Kongreso.

Dum la kunsido de Gijon sub prezido de S-ro Jimenez Mora, post legado kaj aprobo de la raporto de la antaŭa laborkunsido, unuanime decidis:

I.^e Danki la Aŭtoritatulojn kaj samideanojn de Gijon pro ilia afabla kaj gastama akcepto favora al la Kongreso;

II.^e Nomi S-rojn Vicente Inglada kaj Emilio Herrera Unua kaj Dua Honoraj Vicprezidantoj de H. E. A., respektive.

Sekve la Sekretario legis la decidojn de la Kongreso por diskonigi kaj fina aprobo, aŭ malaprobo, aŭ aliformigo, laŭ la statutoj:

1.^{an}—Danki Lian Reĝan Moŝton Don Alfonso XIII.^{an}; Asturiajn Aŭtoritatulojn kaj Societojn, kiuj per sia efika helpo plene sukcesigis la Kongreson.

2.^{an}—Esprimi per telegramo al Lia Moŝto D-ro. Cortezo plej korajn salutojn kaj bondezirojn.

3.^{an}—Esprimi sinceran dankemon al la Loka Kongresa Komitato, respektive de Oviedo kaj Gijon, pro la belega kaj plensukcesa organizo de la Kongreso kaj de la Internacia Ekspozicio de Lernejoj Laboroj.

4.^{an}—Aprobi la Raporton de la VII.^a Kongreso en Sevilla kaj la Raporton de H. E. A. kaj de la Instituto.

5.^{an}—Distribui la monhelpon de la Ŝtato al H. E. A. laŭ propra iniciativo de la Komitato.

6.^{an}—Ke oni interesigu la Registaron pri oficiala invito de Hispanujo por okazigi en Madrid Universalan Kongreson de Esperanto en 1930.

7.^{an}—Interesigi la Hispanajn Societojn de Ruĝa Kruco por ke ili plenumu la koncernan artikolon de sia Regularo pri la lernado de Esperanto.

8.^{an}—Por plifortigi la Nacian Esperantistan Organizaĵon, rajtigi la Grupon «Frateco» de Zaragoza por ke ĝi, akceptante kaj kunigante sugestiojn de ĉiuj esperantistoj de la lando, ne

konsiderante ĉu ili apartenas al H. E. A., ellaboru projekton de reorganizo de Regularo de H. E. A., kaj prezentu en plej proksima Kongreso ĝin.

9.^{an}—Fiksi la membran kotizaĵon je 1,50 pesetoj poĵare.

10.^{an}—Sendi Membroliston de H. E. A. al ĉiu membro.

11.^{an}—Demandi la samideanojn de Barcelono kaj Zaragozo ĉu ili estas pretaj organizi la IX.^{an} Nacian Kongreson.

La decidoj estas aprobitaj, kaj la Prezidanto fermis la Kunvidon.

Okaze de la Kongreso estis kunvenoj de Astura Esperanto-Federacio, de la Hispana Esp. Fervojista Ligo, kaj parolado de nia eminenta samideano S-ro Emilio Herrera pri lia vojaĝo al Ameriko sur la Zeppelin, hispane, kun helpo de lumbildoj, li allogis simple elokvente disvolvigis la temon. Ĉi tiun okazin-taĵon organizis la Popola Ateneo en la Teatro Principado, sama de la Kongresa muzik-festo, kaj invitis ĉiujn gekongresanojn. S-ro Herrera, je la fino, rimarkigis ke Esperanto estas nepre necesa lingvo por la aerlinioj kaj ke, konsciinte tion, iuj Kompanioj, kiel K^{to} Farman, uzas Esperanton.

Ni havos belan filmon de la Kongreso de Oviedo same kiel ni ĝin havas de tiu de Madrido.

Ĉi tiu Kongreso alportis al mi grandajn ĝojojn: konatiĝi persone kun pastro Cristobal Fournier, kun kiu mi interrilatiĝis de antaŭ multaj jaroj; kun la fervora pioniro de Cabruĝana, pastro Anselmo Albarells, kiu esperantigos siajn ĉirkaŭaĵojn; kun la kompetenta profesoro de Trasona, antaŭ sukcesanta propagandisto de nia lingvo kaj sperta samideano, pastro Honorato Moncalvillo; kun la viglega entuziasmega ĉiam elpensanta samideano de Gijon, kompetenta inĝeniero, S-ro Francisco Mendez Rua, kun aliaj karaj gesamideanoj kaj kun la mirinda nepriskribebla regiono kiu certe baldaŭ estos forta centrejo de Esperanto.

RIMARKOJ KAJ SPERTOJ

La Kongreso tutplene sukcesis: de la vidpunkto de la amuzaĵoj, ĉiam utilaj por granda kaj grava propagando, la sukceson ni ŝuldas al S-ro Jimenez Mora kaj fratoj Garcia Fernandez speciale, ĉar malmultaj iliaj samurbanoj konstante helpis ilin, aj ĉi tion mi povis konstati per la plendoj de S-ro Jimenez

Mora mem kaj per du faktoj: ĉe la preĝejo mi estis kun la laste aludita S-ro kiam alproksimiĝis ovieda samideano dirante: «ni ne havos aŭtobusojn por iri al Noreña», kaj la konsekvenco estis, ke, pro neplenumo de instrukcioj, S-ro Jimenez Mora, ĉagrenate, forlasis la preĝejon por aranĝi la aferon, kiun li aranĝis. Alian fojon, trairante straton mi kun la fratoj Garcia, al proksimiĝis al ni junulo ordenita de la verda stelo, kiu, sin turnante al la fratoj, diris: «kio okazas», kaj al respondo «ni kongresas», la junulo rediris mire: «mi sciis nenion».


La iniciativo de la sukcesinta internacia ekspozicio el lernejaj laboritaĵoj estas laŭdindegaj, daŭriginda kaj ampleksiginda, ĉar ni per ĝi tre bone sukcesos en la kampo de la geinstruistoj. Festoj kaj akceptoj estis rimarkindegaj.

De la esperanta vidpunkto, ni ŝuldas la sukceson, spite de nekomprenoj kaj pasietoj de iuj, al zamenhofa spirito, kiun nia kara blankbarbulo, profesoro Cart, rimarkis kaj laŭdis dum la Kongreso de Sevilla. Sed la Kongreso de Oviedo ne estis tiel grava, kiel esiis esperinde, ĉar la Loka Organizinta Komitato agis preskaŭ tute sendepende, sen konstanta interrilatigado kun la Centra Komitato, kiu nur agis pri la fervojaj rabatoj kaj pri la honora prezidanteco, kaj tiel ne povis la Centra helpi la laboron de la Loka, kiel okazis por la Kongreso de Sevilla, interrilatiginte la Lokan de Sevilla kun la regionaj delegitoj, instiginte ĉi tiujn al laborado kaj varbado de kongresanoj, pro kio, komparante listojn el kongresanoj de la du kongresoj lastaj, oni rimarkos, ke ni perdis suflĉe da kongresanoj, precipe Asocioj kaj Institucioj. Tiu sendependemo ankaŭ koncerne entuziasmajn, kompetentajn, agemajn kaj influantajn samideanojn de la astura regiono mem malutilis al la esperanta graveco de la Kongreso. Mi mem spertis pri la manko de konstanta interrilatigado, ĉar ofte mi penadis havigi al mi novaĵojn, por ĉi tiujn aperigi sur la gazeto, malgraŭ miaj oftaj petoj, sugestioj pri diversaj aferoj, k. t. p., ĉar apenaŭ mi ricevus iujn leterojn, kaj ĉiam plendantajn iel sed prave pri manko de helpo el la oviedaj samideanoj.

Sincere mi finas ĉi tiun raporton per la *rimarkoj* samtempe spertoj, por ke en la estonteco ni plibone kunlaboradu al sama celo, flankenlasante ĉiajn diferencojn, ne tuŝante la diferencojn, kaj ne opiniante ke kunlaborado, interkonsiliĝo, interŝanĝo de

opinioj, akcepto de iniciativo aŭ aliformigo de io, estas submetigo de iuj al iuj, ĉar ĉi tio ne estis iam, nek povas esti inter ni: la kongresoj estas de H.E.A. kaj loka organizonta komitato nepre devas agi interkonsente kun komitato reprezentanta la Asocion, same kiel okazis por la kongresoj de Madrid kaj de Sevilla, por kiuj neniu iniciativo loka estis nuligata de la centra komitato.

Julio Mangada Rosenörn



LA ILUSTRAĴOJ DE ĈI TIU NUMERO

En la Norda Aragono staras la tre malnova urbo *Oscá* de la Romanoj, nune Huesca, kaj el ĝiaj sufiĉe nombraj monumentoj estas tre rimarkinda la monaĥejo San Pedro el Viejo (Sankta Petro la Malnova), klaside romanstila, en kiu estis monaĥo la aragona reĝo Ramiro II.^a El ĉi tiu monaĥejo estas la rimarkindaj reliefoj kiuj aperas sur ĉi tiu numero.



LA NOMOJ DE JEHOVAH

«La vorto Jehovah havas variajn etimologiojn, sed nur estas veraj tiuj, kiujn entenas la Kabalo», diras la *Sekreta Doktrino* (Volumo II^a paĝo 120—hispana eldono—) kaj ĉe la paĝo 355, ĝi aldonas: «La nomo Jehovah, laŭ sia abstrakta senco, estas sendependa je la dieco al kiu false oni donas ĉi tiun nomon».

Plie, la dieco per tiu ĉi nomo citata de la kvar unuaj ĉapitroj de la *Genezo* ne estas ĉiam la sama persono, kaj ne ĉiam per la nomo Jehovah oni koncernis estanton. La ĉapitro IV^a, paragrafo XXVI.^a, diras: «Tiam la homoj eknomas lin Jehovah»; sed ĉi tiu paragrafo estas malbone tradukita. Laŭ la aludita *Sekreta Doktrino* (Volumo II^a, paĝo 117, de la aludita eldono) devas diri: «Tiam la homoj eknomas sin *viroj* kaj *virinoj*».

La nomo Jehovah aŭ Jod-hevah, estas, efektive, ambaŭsek-sa: *Yod* estas la litero *j*, kiu indikas la virseksan, kaj *hevah* la virinseksan, rememorigante la nomon de *Evo*, edzino de Adamo; ankaŭ ĝi rememorigas la grekan diinon de la juneco kaj la olimpan fianĉinon de Herkuleso, Hebo'n.

Ĉi tiu paragrafo indikas la falon de la homaro en la generacion, en la apartigon de la du seksoj, okazintaĵo dum la ekzistado de la tria raso, antaŭ miliardoj da jaroj. Ĝis tiam la estantoj estis ambaŭseksaj, same, kiel ankoraŭ estas tia la feto dum la unuaj semajnoj de sia disvolvigado, ĉar tute bone oni scias, ke la feto reproduktas la tutan fiziologian historion de la homa speco.

Ĉe la hebrea alfabeto, ĉiu litero havas aritmetikan valoron. Jehovah, laŭ sia dia senco, estas unu el la *Elohim* aŭ *Alhim*; la nombra valoro de ĉi tiuj literoj estas: $a=1$; $l=30$ aŭ 3 ; $h=5$; i (*jod*)= 10 aŭ 1 ; $m=40$ aŭ 4 . La anagramo de ĉi tiuj ciferoj 13514 estas 3'1415, t. e., la valoro *pi*, la rilato de la diametro al la cirkonferenco, abstraktaĵo. Tial la *Elohim'oj* estas la konstruantoj, sed oni ne opiniu, ke *elohim'* estas koeficiento, abstraktaĵo; la *elohim'oj* estas tiel realaj estaĵoj, kiel la homaj spiritoj.

La alhemio (de *alhim*) estas scienco instruanta transformi la koton je oro. La *Elohim'oj* faris Adamon el koto (la unuan ho-

maron), kiu, gustuminte la frukton de l'arbo de l'Scio, fariĝos «*unu el ni*» ĉe la spirita oro de la dieco.

Oni skribas *Jehovah'n* per kvar literoj, per IHVH, kies nombra valoro estas: I (*yod* aŭ *jod*)=10; H=5; V=6, kaj la sumo de la tri literoj malsamaj estas 21, tri fojojn *sep*; dum la sumo de la nombraj valoroj de la literoj de *alhim* estas $3+1+4+1+5=14$, du fojojn *sep*. La unua litero estas *jod* kaj de ĝi devenas la germana *Gott* kaj la angla *God*, kiuj signifas Dion, kies eko estas en la kvinpinta stelo. Oni scias, ke la hebreoj loĝis en Hispanujo dum ok jarcentoj (dum la tuta tempo de la militado kontraŭ la maŭroj), ke la hebreoj konsideris Hispanujon dua patrujo, la dua post Sion'o, kaj ili kunlaboradis tiel, kiel la mahometanoj kaj kristanoj, por formi nian lingvon, kiu pro tio, tial ke ĝin formis individuoj el tri rasoj kaj tri religioj, estos la lingvo de la toleremeco.

La nombra valoro de la litero *jod* estas *dek*, bazo de la numeralo sistemo, kaj nombro signifanta la generacion. La cifero 1 estas virseksa, la O (nulo) estas la virinseksa elemento, kaj per dek punktoj oni formas la pitagoran triangulon aŭ dekon

..... La scienco elpruvis, ke en la konsisto el ĉiuj ĉeloj de ĉiuj vivantaj organismoj estas hidrogeno (*mono-dinamo*), oksigeno (*di-dinamo*), nitrogeno (*tri-dinamo*), kaj karbono (*tetra-dinamo*), kaj $1 + 2 + 3 + 4 = 10$.

La litero H (kies nombra valoro estas 5) estas simbolo de la utero. Ĝi estas ripetata, kaj dufoje 5 estas 10.

Jehovah estas ambaŭseksa same, kiel la Luno, kaj inter ili ekzistas iu rilato: La Luno prezidas la funkciojn de la nasko, kaj atestoj pri tio estas la virinfenomeno po ĉiu lunmonato kaj la periodoj de la disvolvigado de la feto; Jehovah ne promesas al sia popolo ĉielon post la morto, sed multenombran idaron, kaj la hebreoj ankoraŭ konservas la lunjaron el dekdu lunmonatoj. Komentariante ĉi tiun aferon diras Blavatsky en la aludita verko (Volumo II, paĝ. 367): *Hecate Luno*, avida je sango estas la inda duobligito de la ĵaluza dio de la judoj».


